

CxEA-RETKOMUNIKOJ estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por cxiuj rete atingeblaj CxEA-membroj, sed ankaux senpage sendata al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne deziras ricevadi ilin, sufcixas via mesagxo kun la teksto "Nesendadu" en la temlinio al <chrdle@kava-pech.cz> kaj ni tuj eligos vian retadreson el la dissendolisto.

ENHAVO

1. Paneo de la dissendolisto de CxEA-retkomunikoj
2. Renkontigxo kun francaj esperantistoj
3. Sxangxo de la tempo de Ekumena Diservo cxisabate
4. Sxangxo de la loko de Expolingua
5. Invito al Svitavy
4. KAEST - randevuo de fakuloj
6. Alvoko al la organizantoj de E-eventoj
8. Kultura Festivalo en Usti nad Labem
9. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (regula rubriko)

1. Paneo de la dissendolisto de CxEA-retkomunikoj
Bedauxrinde pro paneo de komputilo malaperis la dissendolisto CxEA-retkomunikoj. Tial multaj el vi ne ricevis la retkomunikojn 5/2006 pri kio ni petas pardonon kaj kelkaj ne ricevos ecx cxi tiujn. Male, iuj ricevos ilin kelkfoje. Ne estas en niaj fortoj ekscii, cxu iu retadreso estas duobla, nek cxu ni rericervis cxiujn abonantojn. Mi do petas vin demandi viajn konatulojn esperantistojn, cxu ili ricevis cxi tiujn retkomunikojn kaj kaze ke ne, kaj se ili interesigxas pri tio resti informataj, sufcixas sciigi la retadreson al chrdle@kava-pech.cz kaj ni enigis ilin en la dissendoliston. Ni petas por la kompreno.

2. Renkontigxo kun francaj esperantistoj
Renkontigxo kun francaj esperantistoj, kiuj partoprenas cxi-semajne InPaSem, okazos en Dobřichovice apud Prago, pensiono Sokol, cxi-sabate ekde la 14-a horo. Cxiuj interesatoj estas invitataj.

3. Sxangxo de la tempo de Ekumena Diservo cxisabate
Pro la tempaj ebloj de la orgenisto, la Ekumena Diservo en Esperanto cxi-sabate en la Kastela Kapelo en Dobřichovice komencigxos nur je la 18-a horo! Tamen vi ne enuos, se vi venos pli frue kaj partoprenos la kunvenon kun francaj esperantistoj, rig. pli supren.
Pliajn informojn kaj la priskribon de la vojo por ambaux cxi-sabatajn arangxojn vi petu cxe chrdle@kava-pech.cz

4. Sxangxo de la loko de Expolingua
Atentu, ke estas sxangxita la loko de la Expolingua (10.-11.11.2006). Gxi okazos en la Nacia Domo (Národní dům), Náměstí Míru 9, en la praga kvartalo Vinohrady, la metroostacio Náměstí Míru.
Vendrede tie okazos la minikurso de Esperanto, kiun gvidos Dagmar Chvátalová kaj Miroslav Vaněk. Pliaj informoj pri Expolingua cxe:

<http://www.expolingua.cz/index.php?id=24>

5. Invito al Svitavy

La 7-an de oktobro okazos Esperanto-arangxo ankaux en Svitavy. La renkontigxo okazos inter 8:30 kaj 9:00 cxe la fervoja stacidomo. Antauxtagmeze oni promenos tra la urbo kun klarigaj vortoj fare de urba historiisto kaj posttagmeze videoprezentado de K. Janík pri vizito de Panamo kaj Kolombio kaj aliaj encxambraj programeroj. Pli da informoj cxe: dvorakovalibuse@quick.cz

6. KAEST - randevuo de fakuloj

Tradicia renkontigxo de fakuloj - Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko - okazos cxijare inter la 10-a kaj 12-a de novembro en Dobřichovice. La listo de la kontribuoj estos pendigita cxe: <http://www.kava-pech.cz/kaest>, kie vi ankaux jam nun trovos cxiujn bezonatajn informojn kaj aligxilon.

6. Alvoko al la organizantoj de E-eventoj

Karaj organizantoj de Esperanto-eventoj, ni tre volonte informos en CxEA-retkomunikoj ankaux pri viaj arangxoj, sed ni devas pri ili scii! Baldaux ni dissendos la kalendaron por la venonta jaro. Por ke gxi estu kompleta, bv. sendi bazajn informojn al la retadreso chrdle@kava-pech.cz

7. Kultura Festivalo en Usti nad Labem

La 18-a Internacia kultura festivalo okazonta de la 8-a gxis la 10-a de decembro 2006, kune kun la 27-a Cxehxa-Saksa tago, estos dedixotaj al la 100-jaraj naskigxjubileoj de Esperantaj verkistoj kaj tradukistoj Jiří Kořínek kaj d-ro Tomáš Pumpr. Informoj: m.smycka@seznam.cz

8. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (regula rubriko)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) prezentigxis inter la 22-a kaj 24-a de septembro dum la 12-a konferenco de CxEA en České Budějovice. Inter gxiaj partoprenantoj estis cxirkaux deko da junuloj, inter ili ankaux la triopo, kiu iniciatis la refondigxon de la junularo en 2005. Cxefaj kontribuoj de CxEJ al la programo estis prezento de tri cxehxaj filmoj subtekstigitaj en esperanto, okazigo de plurparta pliboniga kurso de esperanto kaj tre sukcesinta vendado de la DVD Esperanto Elektronike. Flanke de la konferenco okazis ankaux komitatkunveno de CxEJ.

Pasintan semajnfino (2006-09-29/10-01) kvar cxehxaj esperantistoj, inter ili tri CxEJ-anoj, partoprenis la Artajn Konfrontojn en Esperanto (ArKonEs) en Poznanio. Danke al ili okazis filmoprotektoj kaj Dan MRÁZEK venkis en la tradicia oratora konkurso.

Kiu maltrafis la pasintan numeron de "CxEJ aktivas", povas konsulti la arhxivon en la retpagxaro de CxEJ. Tie nun haveblas ankaux cxehxlingvaj tradukoj de cxiu aperintaj numeroj. Detale kaj aktuale pri cxehxa junularo legu cxe <http://www.esperanto.cz/cej>

